SCIENCA REVUO oficiala organo de ISAE
Vol. 33 (1982) N-ro 1 (139) esperantologia kajero

Eldonanto: Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
Ĉefredaktoro: *RNDr. Josef Kavka, CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice,* Ĉeĥosl.
Redaktoro de la esperantologia kajero: Inĝ. *Jan Werner, Kroftova 84, CS-616 Brno,* Ĉeĥoslovakio
Grafika redaktoro: *Brunetto Casini,* Edistudio, *cas. post. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
Administranto por la pagipovaj landoj: *Brunetto Casini,* pĉk 12230561, Edistudio, Italujo
Administranto por la nepagipovaj landoj: *Dr. Václav Hník, CSc., Fakulta architektury ČVUT, Thákurova 7 — CS-166 34 Praha 6 — Dejvice,* Ĉeĥoslovakio
Kompostis: *Composit, via Giordano Bruno 8, I-56100 Pisa,* Italujo
Enpaĝigis: Edistudio, *c.p. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
Presis: *Massarosa Offset, Massarosa (LU),* Italujo

Reguloj por la aŭtoroj.

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ĝin komprenu eĉ alifakaj sciencistoj;
2. Sendi al mi la tekston en 2 ekzempleroj, klare tajpitaj sur maldika papero;
3. Maŝinskribi normallitere en la tajp-areo de 165 mm × 250 mm, kun la liniado $1^1/_2$, t.e. kun 40 linioj surpaĝe;
4. Ĉiun vorton neesperantan substreki ondlinie (por la kursiva komposto), dum rektlinia substreko signifas komposton dikliteran;
5. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj;
6. Ne forgesi referenc-liston;
7. Aldoni koncizan resumon en sia gepatra lingvo.

Estraro de ISAE:

Prezidanto: Prof. D-ro *Carl Stóp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N- Oslo 2,* Norvegio
Vicprezidantoj: Prof. *Sin'itirô Kawamura, 424-7 Kinasityô Huzii, Takamatu, 760,* Japanio
Prof. *Vasil Peevski* D-ro *hc., Gogol 9, BG-1504 Sofia,* Bulgario
Ĝenerala sekretario: *Christian Darbellay,* inĝeniero, *Jostenallee 45, D-4040 Neuss 1,* FRG
Sekretario-kasisto: Prof. *Paul E. Kustaanheimo, Danmarks Tekniske Højskole, 040 DIA-E, DK-2800 Lyngby,* Danlando
Aliaj estraranoj: S-ro *Rüdiger Eichholz,* direktoro de TC-ISAE, *R.R.I, Bailieboro, Ontario, K0L 1B0,* Kanado
D-ro *W.A. Verloren Van Themaat,* direktoro de IC-ISAE, *Volkerakstraat 38[I], NL-1079 XT Amsterdam,* Nederlando
D-ro *Josef Kavka CSc.*
S-ro Bruĉjo Kasini, *cas. post. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
D-ro *Václav Hník CSc., Podjavorinské 1609/6, CS-149 00 Praha 4 — Chodov,* Ĉeĥoslovakio
D-ro *Gerhard Kalckhoff, Schuckertstraße 14/XI, D-8000 München 70,* F.R. Germanio

Kiom da reguloj vere havas Esperanto?

Douglas B. Gregor (Britio)*

Zamenhof (1905) mem nomis sian gramatikon "16-regula" kaj jam en 1887 li aludis al la *"allereinfachsten, jedermann zugänglichen Regeln"* (poste tradukita: 1903: "simplaj kaj por ĉiu kompreneblaj reguloj", OV 21/11). Sendube, ĉi tio estas la bazo de la kredo je la facileco de Esperanto. Kio? Nur 16 reguloj? Oni gapas kaj eklernas. Tiam ...

Por la lernanto, "regulo" signifas tion, kies malobeo konsistigas eraron kaj tial perdon de poentoj en ekzameno. Laŭ tiu kriterio kaj se Esperanto vere havus nur 16 regulojn, neniu ekzamen-kandidato povus fari pli ol 16 erarojn. Kia beleco! Sed pro tio, ke la faktoj estas aliaj, necesas esplori, kion signifas la vorto "regulo".

Laŭ *J. Marouzeau* (1933), la termino **regulo** apartenas sole kaj nur "al la normiga gramatiko", kiu konsistas el "normoj, dekretitaj de teoriuloj" aŭ "akceptitaj de la uzado". Ĉi tie mi memoras, kiel antaŭ multaj jaroj mi partoprenis en konkurso por verki novan gramatikon de la itala lingvo por angloj. Tre baldaŭ mi konsciiĝis pri la malfacileco fiksi, kio vere konsistigas lingvan korektecon, t.e. kiel formuli regulon; kaj tial mi transiris al la sistema kolektado de ekzemploj de esprimoj el la itala literaturo mem, por el ili **dedukti**, kiamaniere la italoj sin esprimas en ĉiuj lingvaj situacioj. Dekkvin jarojn poste, kiam la konkurso estis jam de longe gajnita kaj la venkinta libro publikigita, mi trovis min kun pli ol 6.000 ekzemploj, ilustrantaj regulojn pri uzado, kies formulado okupis preskaŭ 300 grandajn tajpitajn paĝojn. Mi eĉ ne kuraĝis proponi ĝin al eldonejo kaj devis kontentiĝi per mia privata pligrandigita scio.

La teoriulo do estas iasence leĝdonanto pri lingvo; sed malantaŭ li troviĝas

* magistro, emerita licea profesoro pri la greka, latina kaj itala lingvoj, *34 Watersmeet, Northampton NN1 5SG.*

la publiko, uzanta la lingvon (ne ĉiam korekte) kaj inter ili aparte la verkistoj, la veraj konstruantoj de la bona lingvaĵo. Estas signifplene, ke en sia verko de 1903 (OV 42) *Zamenhof* klarigas ties celon kiel "por ke ekzistu iaj modeloj, leĝdonaj (ne "gvidaj" kiel ĉe *Dietterle* 1929) por ĉiuj", kaj du jarojn poste li priskribas la tri verkojn de **Fundamento** kiel "leĝojn por li" (OV 44/3). Evidente do *Zamenhof* volis instrui la regulojn de Esperanto pere de la efektiva uzado de la verkistoj. Inter ĉi tiuj estis kompreneble li mem; kaj kvankam li ne volis esti "leĝdonanto" (OV, 1889), li devis, kiel la unua verkisto en Esperanto, komence esti tia. La prozaj kaj poeziaj "Ekzemploj" en Unua Libro efektive leĝdonas pri la Esperanto-sintakso: **Patro nia** prezentas al ni nian unuan rilatpropozicion; el **El la Biblio** ni lernas la Esperanto-apartaĵon, la predikatan nominativon; **Letero** ilustras la uzon de **ĉu**, de **da**, de la adverba participo, de la adverbo post nepersona **estas** kaj la konstruon de jenaj subpropozicioj: la dependa demando, la nerekta parolo, la konsekutiva, tempa kaj kondiĉa (reala kaj nereala) propozicioj.

Mi diras "ilustras", ĉar oni apenaŭ povas paroli pri instruado, kie tute mankas klarigo. Mi bone memoras, kiel iam mi devis multe cerbumi pri la adverba participo, fenomeno fremda al dekkvarjara anglo, ekkoninta nur la francan kaj la latinan, kaj pro kiu mi superŝutis la grandan *M.C.Butler* per knabecaj leteroj, petantaj (senpagan) klarigon. Estas atentinde, ke nur la angla Unua Libro enhavas tutan frazon pri la du "formoj" de la participo kaj ke la Esperanto-eldono, poste verkita por **Fundamento**, ne tre klare parolas pri participoj "kun senco adjektiva aŭ adverba", volante diri "kun formo".

Zamenhof evidente atendis, ke lingvistoj deduktos la regulojn el ĉi tiuj frazoj kaj poste verkos lernolibrojn ĉiu en sia gepatra lingvo; kaj ĝuste tio okazis. Tiamaniere *Zamenhof* kvazaŭe dungis teamon de lingvistoj, kiuj sentime leĝdonis pri la lingvo. Sed kion ilustras tiuj ekzemploj, se ne regulojn? Do jam en **Unua Libro**, aldone al la 16 "reguloj" ni havas 13 pliajn regulojn, el kiuj kelkaj estas reformulitaj en la malgranda Vortareto de ĉ. 920 vortoj, kiu en 1893 eniris **Universalan Vortaron** same enhavantan kelkajn gramatikajn klarigojn.

En 1894 aperis **Ekzercaro**, kies funkcio estis fari sur pli granda skalo tion, kio estis farita per "Ekzemploj" de **Unua Libro**, nome prezenti la sintakson de Esperanto en la plej facile digestebla formo. Krom la jam viditaj reguloj, ni lernas ĉi tie, ekz. ke malgraŭ la silento de "regulo" 6, Esperanto tamen havas konjunktivon (volitivon) (Ekz. 19,2); ke **por** devas enkonduki celadjektan infinitivon (19,5); ke **apenaŭ** povas servi kiel subjunkcio ("tuj kiam", 19,5); ke la infinitivo povas esti objekto de verbo (5 kaj 6): "petis de ŝi trinki", "doni al vi trinki"). Do Ekz. 19 sola aldonis 4 regulojn.

Kio do estas la diferenco inter la 16 "reguloj" kaj ĉi tiuj reguloj?

Indiko, ke iaspeca diferenco subestas, troviĝas en la fakto, ke en **Unua Libro** la unuaj ok "reguloj" estas nomitaj "partoj de parolo" en ĉiuj kvin lingvoj; ja ĝuste pri tio temas, nome: I. la artikolo difinita; II. la substantivo nominativa, akuzativa kaj plurala de ambaŭ; III. La adjektivo kaj ties komparativo kaj superlativo; IV. la numeraloj fundamentaj, ordaj kaj kun la sufiksoj **-obl-, -on-, -op-** kaj la vorto **po**; V. la pronomoj personaj kaj posedaj; VI. la verbo: tempoj, modo (nur la ordona), participoj; VII. adverboj; VIII. prepozicioj. La sekvaj ok eroj estas titolitaj "reguloj ĝeneralaj", nome: IX. elparolado ("legado"); X. akcento; XI. kunmetitaj vortoj, kun atentigo, kvazaŭ parenteze, ke "la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj"; XII. malpermeso de duobla negativo; XIII. akuzativo de direkto (sen aludo al prepozicioj); XIV. **je** aŭ akuzativo; XV. fremdaj vortoj kaj iliaj devenaĵoj "laŭ la reguloj de Esperanto"; XVI. la apostrofado de la artikolo kaj de la substantivo.

En kio tamen vere konsistas la aparteco de la 16 "reguloj", tio montriĝas el "regulo 16": "La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭata de apostrofo". **Povas esti?** Ĉu regulo ne preskribas tion, kio **devas** esti? Jen do la diferenco: la 16 "reguloj" **pri**skribas, la ceteraj reguloj **pre**skribas. "Regulo" 16 tutsimple deklaras, ke foje la artikolo difinita aperos sen **-a**; sed la limigo de tiu formo, la sciigo, kiam oni povas apostrofi kaj kiam ne, tio devas atendi Ekz. 27,4. Same pri "regulo" 1: ĝi tutsimple deklaras, kio estas la normala artikolo difinita; ĝia uzado (tiel malsimpla por multaj) estas unuafoje klarigita en Ekz. 27,1-3. Estas kvazaŭ ni havis ĉi tie la bazan skizon de Esperanto, kia ĝi kuŝis en la kajero de *Zamenhof* post lia reverkado de Pra-Esperanto. La unuaj ok eroj konsistigas la esencon de lia sistemo, tion, kio distingas ĝin de ĉiuj antaŭaj projektoj. Kompreneble, li volis meti antaŭ lernantoj tiun distingan kadron. Tamen, eĉ tiam estas strange, ke li tute ne mencias tion, kio konsistigas la veran bazon de la facileco de Esperanto, nome la vortfaradon: pri tiuj mirindaj prefiksoj kaj sufiksoj (krom la numeralaj) li tute silentas. Eble li pensis, ke li jam sufiĉe parolis pri ili en la unua parto de la enkonduko; sed estu kiel ajn, li poste preferis meti ilin en **Ekzercaro**n kaj **Universala**n **Vortaro**n, kune kun la korelativoj, por ke ili estu lernataj dum la studado de la lingvo. Tial ni aŭdas ĉi tie pri nur du pronomoj; tial, li metis ĉion sintaksan en **Ekzercaro**n.

Arbitraĵoj tamen restas: ĉu la malfacila distingo inter **de** kaj **da** (Ekz. 31,6 kaj UV) ne estas tiel karakteriza de Esperanto kiel **je**, kiu cetere estas poste repritraktita en Ekz. 23,3 kaj 29,3? Ĉu **ĉu** mem ne elstaras kiel baza kaj esenca ero egale kun la "partoj de parolo"? Ĉu la akuzativo de movado post prepozicioj ne pli ĝuste havus lokon aŭ en "regulo" 8, aŭ en "regulo" 13 anstataŭ atendi Ekz. 28? Oni povus daŭrigi, sed ĉio sumiĝas en tio, ke en la 16 "reguloj" *Zamenhof* volis priskribi, ne leĝdoni.

Ĉi tio kunportas la paradokson, ke ĝuste kiam *Zamenhof* prezentas la lingvon kiel facilan, la manko de klarigoj faras ĝin malfacila por ĉiuj, krom lingvaj kleruloj. La senĝena uzado de vortoj, kiel "nominativo" kaj "akuzativo" (reg. 2) montras, ke *Zamenhof* skribis por homoj, kiuj posedis ian bazan instruitecon. Li neniam estis instruisto, ĉiam mem havis bonajn notojn en siaj ekzamenoj (v. *Halina*-Doku. 1977), do ne povis imagi la veran situacion en klaso de lingvaj ne-inicitoj. Li do volis en **Gramatiko** nur priskribi la lingvon laŭ ĝiaj esencaj trajtoj, por ke estontaj instruistoj, helpataj de liaj ekzemploj, povu enirigi ĝin en la cerbojn de eĉ tute nekleraj homoj. Tiamaniere li evitis esti leĝdonanto kaj samtempe ne fortimigis lernantojn per peza (kaj multekosta) lernolibro.

Estas bedaŭrinde, ke *Zamenhof* nomis ĉi tiujn 16 priskribajn erojn "reguloj". (Li eĉ ŝanĝis la titolon "Partoj de la parolo" en "Reguloj" por la eldono de FK; kaj la reiro al la unua titolo en **Fundamento** du jarojn poste ŝuldiĝas sendube al la uzo de pli frua eldono). Reguloj ili estas, kompreneble; sed ne pli tiaj ol la aliaj reguloj, silente preskribitaj en **Ekzemploj** kaj poste klarigitaj en **Ekzercaro**. Ili eĉ ne prezentas skeleton de la lingvo, kiel faras la dek (!) reguloj, post kiuj oni povas tuj verki en *Volapük (Arie de Jong)*. Ili estas tutsimple 16 heterogenaj karakterizaĵoj de Esperanto, kiujn *Zamenhof* ial volis substreki. Ni rimarku, tamen, ke *Zamenhof* neniam diris, ke Esperanto havas nur 16 regulojn. Kion li diris, tio estas, ke lia **gramatiko** havas (nur) 16 regulojn; kaj tio estas ja vera, ĉar tiel li decidis. (Notu, ke troviĝas minuskla **g** en OV kaj Antaŭparolo nur pro tio, ke antaŭas la vorton la adjektivo "16-regula", kie la cifero kaŝas la majusklon. Ke temas pri la sekcio 'Gramatiko', tion montras la tuj poste sekvanta aludo al "tiuj tri verkoj".) Kiel montrite, pliaj reguloj sekvas en la postaj sekcioj, kaj eĉ tiuj ne elĉerpas ilin.

Komencante ĉi tiun studon, mi intencis sciigi al la esperantistaro la efektivan sumon da reguloj; sed mi rezignas. (Ĉu oni iam sumigis la regulojn de la franca lingvo?) Sufiĉu, ke ili estas multe pli ol 16, sed ke ni ĉiam povas fiere

proklami, ke Esperanto havas pli malmulte da reguloj (t.e. memorendaĵoj) ol aliaj lingvoj.

Referencita literaturo

Arie de Jong ( ): Short Grammar of Volapük. — J.S. Cams, Switzerland.

Dietterle, J. (1929): Originala Verkaro de *Zamenhof.*

Edelbaum, H. (1977): *Halina*-Dokumento pri la studentaj jaroj de *Zamenhof.* (Kun komentaro de akademiano *N. Kawasaki.*) — *Ĵuntaro Iŭaŝita, Osaka.*

La Esperantisto (1889): *N-ro 1 (Probenummer). — C. Schmidt, Nürnberg.*

Marouzeau, J. (1933): *Lexique de la terminologie linguistique.*

Zamenhof, L.L. (1887): Unua Libro (por la germanoj. Antaŭparolo, p. 9) — *Kelter,* Varsovio.

Zamenhof, L.L. (1893): Universala Vortaro de la Lingvo Internacia (en ses lingvoj) — *Kelter,* Varsovio. (Represita en Fundamento).

Zamenhof, L.L. (1894): Ekzercaro de la lingvo Esperanto — *Kelter,* Varsovio (Represita en Fundamento).

Zamenhof, L.L. (1903): Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto. (Antaŭparolo) — *Hachette, Paris.*

Zamenhof, L.L. (1905): Fundamento de Esperanto (Antaŭparolo) — *Hachette, Paris.*

How many rules has Esperanto really?

Zamenhof called his **Grammar** *"16-ruled" (OV 44/1); but if this were so, one could not make more than 16 mistakes! Evidently, there is something special about those 16 "Rules". If we look at the illustrative material in the* **First Book**, *we see examples of ten syntactical constructions, and in the later* **Exercises** *many more. Since these show us how to express certain ideas, they are rules. Usually, no explanation is given; in other words, Zamenhof was relying on linguist-learners to explain the rules in text-books produced for their fellow-countrymen. (Note the technical language of the* **First Book**). *It is significant that the first eight "Rules" were originally called "Parts of Speech". This and the language of Rule 16 show that their specific quality is, to be descriptive (namely, of Esperanto's essence), whereas the other rules are prescriptive. If Zamenhof hat set out these rules as in la Latin Grammar, he would have frightened off the ordinary student. (Much, however, is arbitrary:* **why is je in the 16 and da not? Because je makes Esp. easier, while da makes it harder?** *Is that the criterion? As a matter of fact, Zamenhof never said that Esperanto had only 16 rules. What he said was that his* **Gramatiko** *had only 16 rules, which was correct but of little significance, because the choice was arbitrary.*

How many rules then? Does one ever ask that of French? Let us just say that Esperanto has fewer rules than any other language.

El la plumo de akademiano *Douglas B. Gregor*

1958: La fontoj de Esperanto. SCIENCA REVUO, 92-110. *Purmerend.*
Du notoj pri la Universala Vortaro. SR, 111-115. *Purmerend.*
1959: Ankoraŭ pri la Esperanta Radikaro. SR, 91-92. *Purmerend.*
La Esperanta traduko de la Malnova Testamento. Dek-biblia konkordanco de 518 diskutindaj versoj. XII + 57 p. Propra eldono de la aŭtoro.
1960: Sofoklo: Reĝo Edipo kaj Antigona. (Enkonduko, elgrekigo kaj notoj de *D.B.G.*) - Belliteratura eldon-serio, 16. Eld. *J. Régulo, La Laguna.*
1969: *Atlantis* pluaj teorioj. SR, 133-134. *Beograd.*
1970: La Zamenhofa uzado de kvazaŭ. SR, 145-148. *Beograd.*
1974: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto. SR, 81-102. *Beograd.*
1976: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto (korekta aldono). SR, 153-156. *Beograd.*
1978: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto (2-a aldono). SR, 129-133. Ĉapeko.

J. Kavka

Oni frandu, dum oni povas!

el *esperanto* 10 '82

Ses monatoj post la apero jam duonstoke la libro forvendiĝis.

La plej furora libro de 1982!

Aldo de' Giorgi verkis "subjektivajn poemojn", kiuj temas pri liaj sentoj de amo, maliluziigo kaj soleco. La enkondukon en la versaĵojn de Aldo verkis Marjorie Boulton, kaj Reto Rossetti inventis specialan Rimportreton al la aŭtoro. Akompanas la unuopajn poemojn belegaj fantaziaj desegnaĵoj, kiujn Jean E. Bomford verkis samspeciale nur por tiu libro.

Edistudio, 1982. 64 p, 30 cm, ilustrita, bindita, ISBN 8870360156
18,00 gld. - 33% rabato por mendoj de almenaŭ 3 ekzempleroj
Mendu ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe
Edistudio, tf. +39/50/48670, c.p. 213, I-56100 PISA, pĉk 12230561

SCIENCA REVUO, vol. 33 (1982), n-ro 1 (139)

Pri laŭeble internacia fonetiko de la nacilingvaj grafismoj por la propraj nomoj en Esperanto-tekstoj

Manuel Gomes (Portugalio)*

1. Enkonduko.

Ne temas pri tio, ĉu en esperanta teksto oni uzu aŭ ne uzu, pli aŭ malpli abunde, aŭ ĝis kia kvanto, la nomojn en la originalaj nacilingvaj formoj. Tio koncernas specife la uzantojn mem laŭ ilia individua konscio, laŭ la verkoj (kiel fidindeco de la fontoj, seriozeco de la temoj, eĉ pro adekvataj ebloj, privolata celo k.a.).

Temas jes, pri la konstato de la faktoj. Krome, la nacilingvaj formoj estas devige la konstantaj bazoj por ĉio internacia.

El ĉio la celo estas, trovi globece mezan fonetikan interpreton de la nacilingvaj grafismaj sistemoj tiamaniere, ke anstataŭ ĥaoso vide al tiuj sistemoj oni prefere konsciu pri iu taŭga fonetika esprimo. Kvankam kalejdoskope varia, sub principoj de prononca tolereblo, la esprimo estu eble neniam malpli fidinda ol tiu, kiu estas akirita laŭ asimila procedo.

Precize, tiu ĉi artikolo per si mem ne emas pli ol eltrovi, kiuj implicaj bazaj reguloj ekzistas, kaj per ilia konstato lasi kampon por instigo al kreo de simplaj principoj, akceptendaj por universala fonetika interpretado.

2. Simplaj vokaloj.

La kvin vokaloj "a, e, i, o, u" povas havi, en pluraj nacilingvaj fonetikaj sistemoj, diversajn son-nuancojn. El tiuj oni registras ĉi-sube la plej diferencigeblajn:

* *Silveira-Pico, Açores.*